N-o 5. 1935. 21. VIII.

# BULTENO

## DE ĈEĤOSLOVAKA ASOCIO ESPERANTISTA

*Redakcio kaj administracio:*
*Praha XIX., Uralské nám. 447.*
*Telefona n-ro 718-41.*

*Redaktas:*
*Dr. ST. KAMARYT, Dr. A. PITLÍK,*
*O. GINZ.*

*Senpage por membroj de*
*Ĉs. Asocio Esperantista.*
*Aperas sesfoje dum la jaro.*

**ĈEĤOSLOVAKA ASOCIO ESPERANTISTA kaj GERMANA ESPERANTO-LIGO**

invitas

ĉiujn esperantistojn en nia respubliko al partopreno en

# VI-a ĈEĤOSLOVAKA KONGRESO ESPERANTISTA

**okazonta 27—29-an de septembro 1935**

**EN BRNO.**

PROGRAMO:

**Vendredo:** Vespere je la 20-a: Interkonatiĝa vespero. En Spegulsalono de hotelo Passage, Nová ul. 23.

**Sabato:** Je la 10-a: Solena malferma kunveno. En salono de Stadion, Kounicova ul. 44.
Je la 12-a: Fotografado.
Je la 14-a: Laborkunveno. En Osvětový dům, U solnice, 12.
Je la 18-a: Kunveno pri enlanda unuecigo.
Je la 20-a: Amuza vespero kun artista programo. Kantaj, deklamaj kaj teatraj prezentadoj de Trakt. En salono de Stadion.


**Dimanĉo:** Je la 7-a: Katolika Diservo kun esperantlingva prediko.
Je la 1/29-a: Laborkunveno. Fermo de la kongreso.
Je la 10-a: Partopreno en aŭtomobil-konkurado sur Masaryk-Ringo.

**Samideanoj!**

Kongresoj de ĉeĥoslovakaj esperantistoj neniam estis nuraj manifestacioj. Ili estis ĝis nun kunvokataj sole, kiam estis tre sentata ilia bezono kaj kiam gravaj problemoj estis komune solvotaj.

**En Brno kunvenos esperantistoj el ĉiuj niaj regionoj, por paroli pri aferoj ekstreme gravaj por nialanda movado. La kongreso decidos, ĉu scias la diversnaciaj samideanoj de nia ŝtato marŝi unuigite mano en mano.** Ankaŭ ne mankos paŭzoj por ripozo kaj amuzo. Trakt, bone konata el radio-disaŭdigoj de Brno-stacio, kun Esperantistaj kluboj de Brno zorgos pri altnivela programo.

La daŭro de la kunvenoj estas tiel aranĝita, ke la kongresanoj povos viziti la mondfaman aŭtomobil-konkuradon sur Masaryk-Ringo. Nepre partoprenu en la kongreso, ĉiu, kiu nur iom povas! Ĉiu klubo, grupo sendu delegitojn! Per Via partopreno Vi montros nian forton.



# BRNO.

Ĉu estas Brno interesa kaj bela? Multaj el Vi havos ĉi tiun demandon, veturante vagonare en Brnon kaj vidante grandan urbon, al kiu fruntas du grandaj objektoj, Špilberk kaj Petrov, kun aro da uzinaj kamentuboj kaj vualitan en fumaj nebuloj. Jes, ĝi estas bela, sed alie ol Praha, Bratislava, Liberec, Košice kaj cento de aliaj urboj. La dua urbo de ĉeĥoslovaka respubliko estas tre bone situita kaj en nuna tempo tre grava komunikila centro. Ĝia komerca vivo estas granda kaj vigla, precipe post restariĝo de nia ŝtato.

Natura centro de la urbo estas placo Náměstí svobody kun grandaj komercaj domoj. Sur interesa placo Zelný trh troviĝas Landa muzeo, en kiu estas unika prahistoria fako, riĉaj etnologiaj, zoologiaj, botanikaj kaj natursciencaj kolektoj. Bela kaj valora bildgalerio (originaloj de Tizian) troviĝas en Starobrněnský klášter. Tie vivis kaj eksperimentis glora fiziologo G. Mendel, komponis eminenta Křížkovský. Belan renesancan korton kaj turon havas magistrata domo. Apud bela parko Pisárky, estas situita la Landa ekspoziciejo, konstruita kaj uzita por la Jubilea ekspozicio de l' nuntempa kulturo en la j. 1928. Pisárky estas ankaŭ elirejo al la fama Masaryk-Ringo.

Ne estas eble nomi ĉiujn interesaĵojn de Brno, ili ja estas abundaj, valoraj kaj belaj. Ili indas, ke oni dediĉu al ili atenton, kaj da ili estas tiom, ke ili kontentigos kaj plene okupos ĉiun vizitanton.

*

En la stacidomo (atendejo de la I-a klaso) estos kongresa **akceptejo,** kie Vi ricevos kongresajn dokumentojn. Ĉiu vizitu ĝin tuj post alveno. Se Vi hazarde neniun trovis, veturu vendredon per tramo n-ro 1 aŭ 6 (direktoj: Řečkovice, Královo Pole) hotelon Passage, sabaton per n-ro 3 aŭ 7 (direkto Žabovřesky) Stadion. Ĉeestos tie daŭre funkciulo donanta informojn.

*

**Fervoja rabato.** Oni povos uzi la semajnfinajn biletojn kun 33% rabato, kiuj validos de la 12-a horo vendrede 27. IX. ĝis 12-a horo lunde 30. IX.

## VI-a ĈEĤOSLOVAKA KONGRESO ESPERANTISTA EN BRNO.

# ALIĜILO.

*Nomo:* ..............................

*Profesio:* ..............................

*Adreso:* ..............................

*Ano de: ĈAE, GEL, UEA, ARE, REL*

(Streku, kio ne taŭgas!)

Per pagilo mi sendas kongresan kotizon . . . . . . . . . . . . . . . . Kč 14·—

Samtempe mi mendas kaj pagas:

unulitan ĉambron en hotelo por la 27./9., 28./9. . . . . . . . . . . . . Kč..........

dulitan ĉambron en hotelo por la 27./9., 28./9. . . . . . . . . . . . . Kč..........

privatan loĝejon por la 27./9., 28./9. . . . . . . . . . . . . . . . . . Kč..........

liton en komuna dormejo por la 27./9., 28./9. . . . . . . . . . . . . . Kč..........

bileton por aŭtomobil-konkurado sur Masaryk-ringo . . . . . . . . . . Kč..........

Mia donaco por la kongresa kaso . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . Kč..........

Sume . . . Kč..........

Dato:.............................. ..............................

subskribo.

**GRAVA ATENTIGO!** Ĉar samtempe kun nia kongreso okazas aŭtomobil-konkurado sur Masaryk-Ringo, mendu loĝejon tuj kaj sendu necesan sumon por ĝi. Malfrue aliĝintaj ne povos ricevi loĝejon.

Ĉiu deka aliĝinto ricevos senpage belan libro-premion.

Bonvolu plenigi la aliĝilon klare, kaj por ĉiu persono apartan folion. Se mankas al Vi sufiĉa kvanto da aliĝiloj, mendu ilin ĉe la L. K. K. **(adreso: Jos. Vondroušek, Brno-N. Černovice, Školní 69).** Monon sendu per poŝtŝparkasa pagilo n-ro 103.426, Esperantista klubo, Brno, Ĉeĥoslovakio, Brno. Sur ĝi skribu supre „Kongreso". Aĉetu ĝin po 5 h ĉe poŝta giĉeto, aŭ mendu ĝin ĉe ni.

Aliĝo validas nur se ĝi estas akompanata de plene plenigita aliĝilo kaj de plena pago. Aliĝintoj ricevos kongresajn dokumentojn persone, ĉe alveno; kiu ne ĉeestos la kongreson, ricevos ilin post la kongreso per poŝto.

Prezoj de unulitaj hotelĉambroj de Kč 25·— ĝis 35·—. Prezoj de dulitaj hotelĉambroj de Kč 45·— ĝis 60·—. En privataj loĝejoj preskaŭ hotelaj prezoj. Litoj en komuna dormejo po Kč 6·—. Studentoj pagos Kč 2·50, turistoj Kč 4·—. La cititaj prezoj estas por unu nokto. Prezo de bileto por aŭtomobil-konkurado Kč 8·— aŭ Kč 10·—. Nepre partoprenu ankaŭ tiun ĉi unuarangan sportistan vidindaĵon!

**Hasičská vzájemná pojišťovna**

**(Fajrobrigadista reciproka asekurejo)**

**BRNO,**

**PALACKÉHO 16.**

**Memhelpa instituto de ĉeĥoslovaka fajrobrigadistaro.**

**Tel. 12.910.**

**Garantio: 65,000.000·— Kč.**

*Oni korespondas ankaŭ esperante.*

Ni rekomendas

**STADION,**

**Kounicova ul.,**

unuaranga **restoracio,**
**kafejo,**
**vinejo.**

Restoraciestro J. KOZÁK.

*Bona, abunda menuo*
*tagmeza po Kč 6·50,*
*vespera po Kč 5·50.*

**YMCA, Brno,** Lažanského nám. 8.

**Manĝejo.** Prezoj: matenmanĝo Kč 1·—, tagmanĝo Kč 3·50—5·50, vespermanĝo Kč 3·50 ĝis 5·50. Manĝoj bone preparitaj. Ankaŭ vegetaraj manĝoj. Sen trinkmono.

**Legu** la plej disvastigitan katolikan kaj popolan ĵurnalon **DEN,** informantan *fidinde, bone kaj rapide.* Fariĝu abonantoj de ĉi tiu ĵurnalo. Administracio: DEN, Brno, Dominikánské nám. n-ro 5.

**Oděvní družstvo československých legionářů, Brno,** Jánská 22. Tel. 15.991.

Speciala fabrikado de ĉiuspecaj uniformoj. Vestoj por sinjoroj kaj sinjorinoj.

Perĵura interpretistino de la **germana, angla, franca, esperanta** kaj **itala lingvoj** s-ino **Magd. Jelínková, Brno,** Nová ul. 3, tel. 10.188 (fo. Hromada).

Privata tradukistino el la hispana lingvo ktp. Unuarangaj sciencaj, komercaj, teknikaj tradukoj.

**Národohospodářská propagace Československa**

(Naciekonomia propagando por Ĉeĥoslovakio)

**BRNO, Kounicova n-ro 29**, tel. 11.868.
**PRAHA XII., Rubešova n-ro 17**, tel. 29.397.
**BRATISLAVA, Kempelenova n-ro 10**, tel. 3678.

**Perlo de Karpatoj la banloko**

**Trenčianske Teplice**

donas atentindajn **rabatojn** al niaj membroj. Petu prospektojn kaj kondiĉojn ĉe ĈAE-sekretariejo.

**VIENA FOIRO – 1.-8. septembro 1935**

La fama kunvenejo de tutmonda komercistaro — foiro de Vieno — invitas nin denove.
Esperantajn prospektojn postulu de ĈAE.

**AELA** baldaŭ finpresos kaj dissendos ĈEĤOSLOVAKAN ANTOLOGION, PLENAN GRAMATIKON, TRI VIROJN EN BOATO kaj ceterajn verkojn laŭ la programo.

Ĉiu aliĝu al tiu ĉi grava unuiĝo. Prospektojn sendas ĈAE en PRAHA XIX., Uralské 447.

**EUROPEAN HERALD**

semajna revuo kvinlingva (angla, esperanta, franca, hispana, germana). Informas pri aktualaĵoj kaj helpas lingvo-studon. Kvaronjara abono nun **Kč 24.** Mendu ĉe Libroservo de ĈAE.


Vychází 6krát do roka. — Vydavatel: Svaz čsl. esperantistů v Praze XIX., Uralské n. 447. — Zodpovědný redaktor Fr. Slavík. – Tiskne A. Pražák, Jabloné n. O. – Novinová sazba povolena Ředitelstvím pošt a telegrafů v Praze, č. 102.047-VII-1933. – Podací úřad Praha 45.